RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
22/07/2015 20:02:42

Kunsidas Raúl Castro kun la guberniestro de Bonaero.

La kuba prezidento Raúl Castro, akceptis en Havano la guberniestron de la argentina provinco Bonaero, sinjoro Daniel Scioli, kiu plenumas oficialan laborviziton en la insulo.

Dum la renkontiĝo ambaŭ gvidantoj esprimis sian kontenton pro la bona stato de la rilatoj inter la du landoj kaj dialogis pri la potencialoj ekzistantaj por evoluigi la reciprokajn ligojn en la sferoj ekonomia, socia kaj kunlabora.

Ili pritraktis aliajn temojn de regiona kaj internacia intereso, laŭ estis oficiale informita.

Scioli estis akompanata de Rafael Folonier, sekretario pri internaciaj rilatoj, Carlos Peralta, vicsekretario pri ekonomiaj rilatoj internaciaj, kaj Rafael Perelmiter, ekonomia asesoranto, ili ĉiuj el la provinco Bonaero.

Flanke de Kubo partoprenis Ricardo Cabrisas, vicprezidanto de la ministra konsilantaro; la ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez kaj la estro de la departemento pri internaciaj rilatoj de la centra komitato de la komunista partio, José Ramón Balaguer.